

EKO 2025

En la
memoro

EKO 2025-06. Februaro 2. Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: Sume 300 KB

Renato ne plu inter ni

Jen terura bato por lia familio kaj lia Esperanto-familio. Renato estis bastiono solida kaj firma en defendo de la homaj rajtoj kaj en nia movado batalanto por elstarigi la rolon por landaj kaj lokaj agantoj. Nehaltigebla reta verkemulo, li daŭre levis por ni temojn, kiuj meritis atenton kaj agadon. Granda perdo estas la manko de defiado kaj spronado kiun li donis al ni aktivuloj. Nia movado perdis giganton. Li ripozu en paco. Niaj kondolencoj al Anna L. kaj al liaj infanoj kaj pliaj familianoj. **SMG**



UEA profunde bedaŭras informi, ke forpasis d-ro Renato Corsetti (naskiĝis la 29-an de marto 1941) la 1-an de februaro 2025, en la aĝo de 83 jaroj, en Londono. Eksa prezidanto de UEA (2001-2007) kaj honora prezidanto de UEA kaj TEJO, li estis multfaka kaj energia kunlaboranto kaj unu el la plej eminentaj figuroj en la esperantista movado, kaj en la itala kaj en la internacia, ekde siaj junaj ĝis siaj lastaj jaroj.

Kondolencoj en tri kontinentoj

Eŭropo: Kun granda malĝojo mi sciigas vin ke nia kara Renato forpasis. Li estis por ni, la balkananoj, instigo, helpo, konsilanto. Estas granda perdo por la movado.

Aurora Bute, estraranino de UEA pri la Eŭropa Agado

Afriko: d-ro Corsetti estis grava por la afrika komunumo, kun siaj iniciatoj kaj dediĉiĝo al interkompreno inter kulturoj. Liaj klopodoj por antaŭenigi la uzadon de Esperanto en Afriko kaj liaj subtenoj al diversaj iniciatoj restos grava parto de lia memoro.

Hassano Ntahonsigaye, Burundo

Afriko: Certe Renato estis unu el tiuj grandegaj arboj de nia arbaro, kaj mi ne scias, ĉu ne plu estos tiu arbaro sen tiu arbo. Ni ĉiuj – gepatroj, geonkloj, geamikoj, gefiloj, genepoj de Esperanto – daŭre vivigu Renaton per siaj laboroj, ĉar mortintoj kiel li neniam foriris. Li ripozu en eterna lumo!

Adjévi Adjé. Togolando

Afriko: Mi neniam forgesos lin, li ne estis nur mia amiko sed mia konsilanto dum 35 jaroj. Kondolencojn al la familio, amikoj kaj la esperantistaro. Ripozu lia animo en paco.

Mramba Simba Nyamkindam Tanzanio

Azio: Pakistano: Pro la forpaso de d-ro Renato Corsetti, nia movado perdis plej aktivan aktivulon. Lia nomo kaj liaj servoj ĉam vivos. Nome de nia asocio; Pakistana Esperanto-Asocio kaj Multana Esperanto-Rondo (MER) kaj persone mi kondolencas.

Jawaid Eahsan/Pakistano.; saluton123@esperanto.org

Kondolencoj de ILEI

Mi elkore kondolencas al ĉiuj tiun ĉi grandegan perdon. Li traktis ĉiujn homojn, kulturojn kaj landojn tra la tuta mondo same egale sen kia ajn diskriminacio. Ankaŭ por ILEI li estis granda trezoro kaj pri plejmultaj aferoj mi konsulis lin kaj li ĉiam respondis prompte, tute helpeme kaj efike. Ni daŭrigu liajn aprezindajn sintenon kaj vojon.

Ahmad Mamduhi, Irano, prezidanto de ILEI

La plej sincerajn kondolencojn al la familio! Lia agado restos modelo por ni ĉiuj.

Elena Natikova, Rusio, sekretario de ILEI

Elkorajn kondolecojn al Anna kaj al la familio de Renato. Li faris tiom multe por ILEI kaj la Azia Movado; estos malfacile daŭrigi sen lia gvido kaj helpo. Kun granda malĝojo.

Alessandra Madella, Ĉinio, estrarano de ILEI

Granda perdo kaj bedaŭro. Estis fiero vivi en la epoko de Renato Corsetti en Esperantujo. Ni daŭrigu la vojojn, kiujn li inspiris kaj pavimis. Kondolencon al Anna, Gabrielo, Fabiano kaj Marco, kaj al ĉiuj liaj amikoj kaj kunlaborantoj.

Radojica Petroviĉ, Serbio, estrarano de ILEI

Internacia Kongresa Universitato en preparo

UEA nomumis kiel rektoron de la 78-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) okazonta dum la UK en Brno (Burno) Prof. Vera Barandovska-Frank, ĉeĥino, klasika filologo studinta en Brno, profesorino de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). La limdato por sendi proponojn por IKU estas la **31-a de januaro 2025 (SMG:** sed eble plilongigota). Proponoj estu sendataj al la IKU-sekretario (amri@huji.ac.il). Lige kun la IKU okazos studsesio de AIS kaj la Scienca Kafejo (SK) kiu konsistas el mallongaj (ĉ. duonhoraj) prelegoj, pli popularnivelaĵoj. Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu IKU-prelego, 1-2 kromaj prelegoj kaj eventuale ekzameneto. Kiel en la antaŭaj jaroj, eblos prelegi defore (per registrita prelego aŭ per Zoom), kvankam ĉeestaj prelegoj estos preferataj.

Esperantologia Konferenco en la UK

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la **47-a Esperantologia Konferenco (EK) de CED**, sub la aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). La aranĝo okazos kadre de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno, Ĉeĥio.

La programo enhavos dudek-minutajn referaĵojn elektitajn el la ricevitaj proponoj, kun fina rondotablo pri la nunaj esploraj defioj de esperantologio rilate al la traktitaj temoj. Ni bonvenigas proponojn de Esperanto-rilataj esplorobjektoj en fakoj kiel lingvistiko, historio, sociologio, ekonomiko, juro, antropologio kaj literaturaj studoj; ankaŭ interfakaj proponoj bonvenas. Bonvenaj estos proponoj kiuj analizas aspektojn de Esperanto

rilate al la kongresa temo: Esperanto kaj teĥnologioj. Surbaze de la prezentoj, kelkaj elektitaj tekstoj aperos en la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies*.

Ni invitas fakulojn – precipe junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn – sendi proponojn pri referaĵoj. La proponoj, kun inter 150 kaj 200 vortoj estu sendataj al la retadreso ek47@interlingvistiko.net. La limdato estas la **30-a de aprilo 2025**. Por kontroli la programon de antaŭaj konferencoj, vizitu [la retejon de CED](http://la.retejon.de): <https://interlingvistiko.net/>.

Klaus Schubert kaj Bengt-Arne Wickström, Organizantoj de EK 2025

Stipendio por esploristoj

Doktora stipendio estas por esplori la temon *Lingva Politiko kaj Ŝtataj Krimoj* ĉe Ulstera Universitato, Belfasta kampuso. La doktora tezo celas esplori la rilaton inter lingvopolitiko kaj ŝtataj krimoj, kaj en la nuntempo kaj en la pasinteco, precipe en konfliktaj kuntekstoj. Kandidatoj estas invitataj studi aktualajn lingvajn politikojn, kiuj povas esti konsiderataj kiel ŝtata krimo, ilia naturo, organizo, efektivigo kaj ideologia fono. Alternativo estas studi la hodiaŭajn lingvajn politikojn, kiuj celas rebonigi ŝtatajn krimojn faritajn en la pasinteco. Ĝi estas interfaka temo de studo kiu ampleksas publikan politikon, socilingvistikon, kriminologion kaj ekonomion.

Kandidatiĝoj estas kuraĝigitaj kaj bonvenaj el ĉiuj ĉi tiuj kampoj. Por pliaj informoj pri la temo kaj la kvalifikaj kriterioj, vizitu ĉi tiun paĝon:

<https://www.ulster.ac.uk/doctoralcollege/find-a-phd/20-applied-social-and-policy-sciences/1679874>.

Limdato por sendi kandidatiĝojn: lundo 24 februaro 2025, 16:00 UTC

Direktoroj: Michele Gazzola kaj Kristian Lasslett

Michele Gazzola, Ulster University, www.michelegazzola.com

Verda Majo en la memoro

La 19-an de januaro aperis du-paĝa artikolo en la tutlanda ĵurnalo *Mainiĉi* (**SMG**: Hodiaŭa tago) pri Verda Majo (s-ino Hasegaŭa Teru), kiu agadis en Ĉinio antaŭ la dua mondmilito. Ŝi edziniĝis al ĉina studento kaj sekrete translokiĝis al Ĉinio, kaj kune kun sia edzo agadis kontraŭ la japana invada milito en Ĉinio. Mi aldonas eseon pri ŝi verkitan de s-ino Iŝikaŭa Tieko. Ŝi prelegis pri Verda Majo en la ILEI-konferenco en 2023. <https://saitama.esperanto-rondo.net/bulteno/5702/>

[Parto 1](#) de la artikolo. [Parto 2](#). [Parto 3](#). [Parto 4](#).

HORI Jasuo, Retadreso: horizonto@r.water.sannet.ne.jp

S-ro Semio kaj aliaj agegas en Zhiaozhiang



Granda klaso da lernantoj sekvis la lecionon kun forta intereso. Kelkajn vortojn kaj simplajn frazojn en Esperanto ili jam konis danke al la pretiga laboro de instruistino Suna. S-ro Semio rakontis al ili pri la historio de la internacia lingvo en Ĉinio kaj en la mondo, kaj li prezentis ankaŭ la bazajn gramatikajn regulojn. Choi Manwon el Koreio alparolis la

lernantojn en la korea kaj en Esperanto kun ĉina traduko, kaj mi prezentis salutojn en diversaj lingvoj kaj instruis simplajn demandojn kaj respondojn. Legu pli en facila Esperanto ĉe: <https://uea.facila.org/artikoloj/movado/agado-en-zaozhuang-r462/>

Israela kongreso aprile

La Israela Kongreso okazos inter la 3-a kaj 6-a de aprilo kun postkongreso de la 6-a ĝis la 11-a de aprilo. La programo, ekskursoj kaj aliĝilo aperas en la retejo <https://esperanto.org.il/ik25.html>. Rapidu aliĝi, la loko en la gastejo estas limigitaj.

Amri Wandel, vic-prezidanto de UEA



Floreal - mia kunlaboranto en la CO



Floreal Gabalda (1946 – 04.12.2024) naskiĝis en Francio en la jaro 1946 al hispanaj gepatroj. Post la abiturientiĝo en la jaro 1965 li studis en universitato de Grenoblo kie li ricevis en la jaro 1971 titolon Doktoro-Inĝeniero. Li estis tre modesta. Poste, anstataŭ la militservo, li preferis labori kiel kunlaboranto kaj profesoro en Venezuela Universitato de Teknologio (IUT) en Karakaso, kie li restis kvin jarojn. Esperanton li ellernis samtempe kun sia patro fine de la 1963-a jaro. Li tuj komencis serioze aktivadi en Venezuela Esperanto-Asocio, en junulara

movado kaj en SAT. Li estis honora membro de TEJO.

Informoj el la IFEF-bulteno 2024/3

===== vortoj: 1340 =====

Sendita pro la urĝo sen lingva kontrolo. Bv. pardoni gramatikajn glitojn kaj klavarajn kalemburojn.



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La kvardek kvar numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.